# SENNACIULA LIBERPENSULA PAĜO

Redakcia adreso: ADOLF WALDMANN, Illerstr. 8, BREMEN, Germanio.

## Jen kiel la kristana eklezio ricevas monon.

II.[1]

Alia fakto: Juna knabino antaŭ ne longe mortis en *Karmel* pro frosto k senzorgo. Bona afero por la eklezio. Oni disvastigas la kulton al tiu junulino Terezo Martin. Misiistoj konvertas al tiu kulto indiĝenojn en malproksimaj landoj. Brazilianoj donacas seĝon el oro, pezanta kvardek-kvin kilogramojn. Oni ĝin promenigas dum la tagoj de procesio sur aŭtomobilo. La okazo estas ekspluatata tute moderne. Dum la ritaj ceremonioj oni ne lumigas vaksokandelojn, sed elektrajn lampetojn, kiuj estas des pli lumpovaj, ju pli la donacoj estas grandaj. Girlandoj elektraj ĉirkaŭas la statuon de la sanktulino, aŭtomata aparato ricevas la monerojn de unu franko, kiujn oni en ĝin metas k dum tridek sekundoj la floroj lumas pro dankemo de sankta Terezo.

Sed la piafekto al la „rozo de Lizje (Lisieux)", alia mirindaĵo, postulas, ke oni starigu bazilikon je kosto de okdek milionoj da fr. frankoj. Oni petegas por tio konstante al la riĉuloj k malriĉuloj monon k monon laŭ la ritmo de 40 000 ĝis 50 000 fr. fr. semajne.

Sed tio ne sufiĉas. La sanktulino estu festata en la tuta mondo. La abato *Garibo*, paroĥestro de Leoĵak-Montoban (Leojac-Montauban) en Sudfrancio, petas monoferojn por la starigo de preĝejo je la nomo de Terezo de la Infano-Jesuo; la nova konstruo kostos nur 400 000 fr. fr. Oni akceptas la materialajn donacojn, malnovajn juvelojn; estas promesata al la donacantoj de pli ol mil frankoj, ke ilia nomo estos skribita sur la ŝtonoj de la konstruo k oni preĝas ĉiudimanĉe por la donacintoj. La eklezio scias bonege ekspluati la malvirtojn k vantemon de la homoj.

*Laŭ la jurnalo „Libera Penso"* (Libre Pensée) *kompilis 12 642.*

## El la tuta mondo.

**Usono.**

En Usono oni festas ĉiujare „dankotagon", kies senco estas: Danko al dio pro bonfaroj.

Antaŭ la lastjara dankotago sendis la usonaj liberpensuloj publikan leteron al prezidanto Huver (Hoover), kiu tekstas jene:

„Estimata sinjoro prezidanto!

Tre ĝentile ni proponas, ke la tradicia dankotago en tiu ĉi jaro ne okazu pro jenaj kaŭzoj:

*1. Seko.* La usona popolo ĵus suferegis pro la plej longedaŭra k plej etendita seko en la historio de nia nacio, kiel konstatis la agrikultura oficejo. Dankdiroj devas esti bazitaj sur faktoj; dankon meritas riĉaj rikoltoj. Pro sunbruligitaj grenkampoj oni ne bezonas danki.

*2. Senlaboreco.* Milionoj da familioj estas en mizero; ĉar iliaj nutrantoj ne povas trovi laboron. Ili staras antaŭ vintra malsato k sentas kiel mokegon danki pro neokazintaj bonfaroj. Postuli de la kamparanoj, trompitaj je siaj rikoltoj, postuli de la senlaboruloj, trompitaj je siaj salajroj, en tiu ĉi terura tempo ankoraŭ danki al dio: Tio signifas, postuli krom maljustaĵo mokegon!

Ŝajnas al ni pli oportune, anstataŭ dankotago enkonduki „riproĉtagon".

*„Ateisto"*, 1. XII. 1931.

[1] Vd. ankaŭ la n-on 382.

## *Proleta „Pasko-festo":*

## *Ne kredo – sed scio!*

*J. Burger.*

Laŭ la Volga-melodio.

*„Paskofesto, – jen la tago,*
*kiam Kristo savis nin!" –*
*diras pastroj al popolo;*
*– nepensuloj kredas ĝin.*

*Kiu diras la fabelon*
*pri „farita" homa sav'?*
*Nur trompistoj ĉiam sataj,*
*eble ankaŭ stulta sklav'.*

*Ili jam de du jarmiloj*
*kun la sama fanatik'*
*igas kredi je saviĝo*
*en nebula mistifik'.*

*La rezulto de ĉi kredo:*
*Luksa viv' por parazit',*
*sed por produktantaj homoj*
*vivo en mizer' k ŝvit'.*

*Tial for la iluziojn,*
*ke nin savus religi';*
*ili ĉiuj senescepte*
*servas nur al reakci'!*

*Ne la kredo, – sed scienco,*
*homraci', revoluci'*
*estas la saviloj, kiuj*
*gvidas nin al novsoci'!*

**Meksikio.**

Episkopo Paskual Diaz elvokis la pastraron k la loĝantaron: Rezistu kontraŭ la nova leĝo, laŭ kiu la nombro de la pastroj estu tiom malaltigita, ke por 50 000 homoj nur estu unu pastro. – En Meksiko pro tio la nombro da preĝejoj devas malkreski de 244 al 219.

*„Vezer-gazeto Bremen"*, 31. XII. 1931.

Laŭ ordono de la meksikia registaro estas arestitaj pluraj katolikaj pastroj, kiuj pekis kontraŭ la leĝoj rilate al la eklezio. – Lastatempe la kontraŭeco inter ŝtato k eklezio denove akriĝis. Laŭ ordono de la registaro katolikaj instrudiplomoj estas neagnoskitaj.

*„Popolgazeto Bremen"*, 2. I. 1932.

**Hispanio.**

La nova konstitucio nun estas preta. Laŭ oficiala publikigo de la 11. decembro 1931 la teksto maldetale estas jena:

1. Disigo de ŝtato k eklezio.
2. Ŝtata kontrolo super la tuta instruado.
3. Elpelo de la jezuit-ordeno k konfisko de ĝia propraĵo.
4. Neniaj subvencioj aŭ monsubtenoj por la ekleziularo post paso de du jaroj.
5. La parlamento konsistas el unu sola Ĉambro.
6. Universala voĉdonrajto tiel por viroj kiel por virinoj.

*„Ateisto"*, 1. I. 1932.

**Sovetio.**

La „Kontraŭreligia Radio-Universitato" por grand-distanca instruado en Moskvo nun laboras tutplene en la servo de la kontraŭklerika propagando. La sendoj okazas en rusa k ankaŭ en germana lingvoj. – La katolika ĉeforgano „Germania" de la 18. 12. 31., kiu raportas pri tio, timas „detruon al la eŭropa kulturo" k postulas, per ĉiuj rimedoj akre kontraŭbatali la sendstacion. *11 761.*

**Germanio.**

La nombro da eksiĝoj el la eklezio konstante kreskas. Oni taksas, ke nur en Berlin-centro dum la jaro 1931 eksiĝis 30 000 personoj. Kompare kun la jaro 1930 tio estas pliiĝo je 5000 personoj. *„Liberpensulo"*, 16. I. 1932.

**Aŭstrio.**

Unu el la plej fervoraj protektantoj de la Danubofederacio estas la prelato Sajpel (Seipel), kiu kiel katoliko deziras surtronigi tie Otto v. Habsburg. Samdirekte celas lia subteno al la „Heimwehr"-movado (aŭstriaj faŝistoj), kies disigon li malhelpis. – La socialdemokratoj supozas, ke la „Heimwehr" baldaŭ denove surprizatakos.

*„Fajrero"*, 8. I. 1932.

**Vatikano.**

La administranto de l'Vatikano intervjuis redaktoron de l'„Stampa" (grava itala gazeto) k sciigis lin: La papo instaligas 5000 novajn pastrajn bienojn en Sardinio, Sicilio k Suditalio. – La Tempo (Le Temps), kiu raportas pri tiu intervjuo, konstatas, ke la instalo de unu tia bieno kostas ĉ. 100 000 lirojn. Do la sumo de l'kostoj estas 500 milionoj da liroj (ĉ. 100 milionoj da gmk.). *„Fajrero"*, 8. I. 1932.